



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 1 Januaro, 2013



Kara Leganto, permesu al ni denove elkore kaj tutsincere saluti vin okaze de la Nova 2013 jaro kaj bondeziri al vi sanon kaj sukcesojn sur nia Verda tereno! Vivu Esperanto!

Malgraŭ tradicio, ni ne raportas pri la lasta Zamenhofa tago, kvankam ĝi pasis sukcese, aperis novaj vizaĝoj de estontaj lingvistoj, eĉ probable, de E-stoj, kiuj lernos lingvojn en iu sekreta militista akademio. Nia malnova leganto kaj nun – loĝanto de ŝikaga partner-urbo Beogrado (Serbio) J. Derks sendis interesan artikolon pri Tutmondeca E-o. Ankaŭ vi konatiĝos kun retrovita poemo de la blinda ukraina E-isto Vasil Eroŝenko kaj konsideros, sendube, kiel utila informon pri la sekvanta NASK kaj kongreso de Esperanto-USA. Agrablan legadon!

–La Redakcio

Ordinara Lingvo Taŭga por la Tuta Mondo

61% de la individua membraro de UEA loĝas en Eŭropo (2010). Verŝajne simila elcentaĵo de la esperantistoj en la mondo estas eŭropanoj. Tiu elcento estis sendube multe pli alta en la jaroj de disvastiĝo de Esperanto inter 1910 kaj 1925.

Tio kaŭzas, ke la vortostoko de Esperanto estis daŭre influata de homoj kiuj parolas latinidan, germanan aŭ slavan lingvon. Pro la prestiĝo de la franca lingvo el inter tiuj lingvogrupoj la latinida okupis la unuan lokon. Multaj vortoj kiuj estas uzataj nur de intelektuloj tiel penetriĝis en la lingvon, almenaŭ estis akceptitaj en aŭtoritataj vortaroj. Se oni legas en PIV, oni ofte trovas malfacilajn francajn vortojn aŭ vortojn kiuj devenas ekzemple de la malnova greka lingvo.

Prenu ikonostazo kaj ikonoklasto. Pli bone oni povas diri ikonvando kaj statudetruado, vortoj kunmetitaj el ikono, vando kaj detruo. Jam antaŭ dek jaroj la verkisto-psikologo Claude Piron skribis pri tiu problemo en sia libro “La bona lingvo” kaj esperantistoj formis grupon kun la sama titolo por proponi “simplajn samsignifajn vortojn” (SSV).

Problemo estas ke lernantoj de Esperanto ofte kredas je vortaroj kaj speciale je PIV (Plena Ilustrita Vortaro) kiel fundamenta religiulo kredas je Biblio. Enesto de iu vorto en PIV faciligas la komprenon de vortoj el faka teksto aŭ teksto kun malbona stilo, sed ne estas taŭga gvidilo por mem verki.

Kvankam la vorto ikonoklasto povas esti konsiderata kiel “fremda vorto” laŭ la 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko kaj tial ne estas erara, oni prefere ne uzu ĝin. Ĉar ni esperas ke Esperanto estos pli kaj pli parolata

ankaŭ ekster Eŭropo ni antaŭenigu la uzadon de SSV. Estas du danĝeroj en tiu agado:

1. La falsa emo anstataŭigi eŭropajn vortojn per ekstereŭropaj. Oni ne povas nei ke Esperanto estas eŭropa lingvo laŭ vortostoko. Oni akceptu vortojn kiuj indikas fenomenojn aŭ objektojn el ne-eŭropaj kulturoj, sed proponi anstataŭ januaro unugatsu, anstataŭ februaro dugatsu, anstataŭ marto trigatsu, ktp estus perdo de energio.

2. La ideo ke nefakuloj povas juĝi la necesecon por profesiuloj uzi ne-komprenatajn fakajn vortojn. Se lingvistoj parolas pri la ĉinaj ideogramoj kiel hanzioj, tion ni akceptu. Ĝi apenaŭ estas nia afero.

Nia zorgo koncernu la komunan (ĉiutagan) lingvon, ekzemple anstataŭante la matematikajn vortojn denominatoro kaj numeratoro per subnombro kaj supernombro. Sur tiu tereno gravas ĉiam respekti la 15an regulon de la gramatiko, kiu protektas la fakan uzadon de internaciaj vortoj. Tiam oni devas bone scii kiuj vortoj estas internaciaj: ikonostazo, denominatoro? Por decidi pri tio ni bezonas la helpon de esperantologoj kiuj instruas en universitatoj. Sed ordinara esperantistoj jam povas uzi la programon www.esp-evoluo.org por kalkuli la “gradon de internacieco” de kiu ajn vorto.

En 2009 mi fondis kun Renato Corsetti novan societon “Tutmondeca Esperanto”. Ĉar Renato ekziĝis, mi kandidatas nun kiel prezidanto. Se vi volas sekvi, kion tiu asocio faros estonte, aliĝu al tutmondeca-Esperanto@yahoo.com.

–Johan Derks

Mirin Daĵo

Antaŭ nelonge, vagante tra la virtuala mondo de Vikipedio, mi trovis interesan (multlingvan) artikolon pri fakiro kun E-a kromnomo. Nederlanda desegnisto, pentristo Arnold Gerrit Henskes naskiĝis en Rotterdamo (apud oficejo de UEA) en 1912. Li famiĝis dank’ al senvunda trapikado de la propra korpo per diversaj specoj de

malvarma armilaro. Li ankaŭ glutis vitraĵerojn, razilojn. Kiel fakiro li prenis E-kromnomen “mirindaĵo” kaj konsideris E-on kiel lingvo, povanta unuigi la homaron...

En Vikipedio oni povas trovi informon pri Mirin Daĵo en ok lingvoj, sed mankas E-o. Verkemuloj povas viziti la anglan paĝon: en.wikipedia.org/wiki/Mirin_Daĵo. Sukcesojn! –L. K.

Vasil Eroŝenko (Januaro 1890-1952)

Malespera Koro

*Mi vagis sur tero, mi serĉis tra mondo,
Deziris mi trovi la fratojn amantajn,
Sed trovis aŭ monstrojn aŭ bestojn soraĝajn
Aŭ ruzaĵn simiojn nur ĉion mokantajn.*

*Al frata salut' ili montras la dentojn,
Per mordo respondas manpremon de l' frat',
Respondas per kraĉo la koran fratkison,
La fratĉirkaŭprenon per la perfidbat'.*

*Mi serĉis amikon kun varma fratmano,
Kun koro varmega, fidinda en tut',
Sed vane, mi trovis nur harpiedegojn
Kun longaj ungegoj de l' ruza monstrbrut'.*

*Kaj nun mi laciĝis, mi volas ripozri
Profunde en kor' de l' patrinter' amanta,
Profunde dormante mi sonĝos eterne
Pri frato-amiko min ĉie serĉanta.*

NASK

Nord-Amerika somera

kursaro de Esperanto

okazos 26an de

Junio (alveno) – 5an de Julio (foriro)

en William Peace University, Raleigh NC

(Norda Karolino). Tuj post NASK okazos la

E-USA Kongreso 5-8 julio, 2013 samloke. Ok plenŝtopitaj tagoj de

intensa instruado: 3 niveloj, formalaj klasoj ĉiun tagon plus multaj

eksterlecionaj agadoj; 3 manĝoj tage, dupersona dormoĉambro (aŭ

privata dormo-ĉambro kun aldona kosto) US\$725 antaŭ la 22a de

marto, US\$775 post la 22a de marto. Iom da stipendia helpo haveblas,

aparte por plentempaj studentoj, instruistoj kaj tiuj el latinamerikaj

landoj <http://esperanto.org/nask/> aŭ kontaktu la administranton:

Ellen M. Eddy, eddyellen@aol.com.

Pardonpeto

La redakcio pardonpetas, ke en la decembra numero de nia bulteno

ni ne menciis nomon de aŭtorino de la fama kanzono “Bésame

Mucho”, E-tradukon de kiu ni prezentis, meksika kantverkistino

Consuelo Velázquez.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago

p/a Viktoro Pajuk

8228 O'Connor Dr., # 2F

River Grove, IL 60171

(773) 344-2276

www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski

Vicprezidanto – Anonimulo

Eksprezidanto – Viktoro Pajuk

Sekretario – Gertrude Novak, MD

Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;

Familia membro: \$30,

Regula: \$20

Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the

Esperanto Society of Chicago,

and mailed to our Treasurer,

Charles Gunn

828 S. Ada St,

Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon

de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Februaro – Prezidanta horo

26an de Marto – temo estos
anoncata